

**LEK Jarkunsido**

... okazos en 28a marto. Kun ĉi tiu bulteno vi ricevos suplementon rilate al tiu kunsido.

**Kluba Programo:****marto:**

- 7 Socia vespero
- 14 Ruta Kereviciute: *Historio de la Ĉokolado (kun gustumado)* (1800h: konsilantaro)
- 21 Olga Kerzjuk: *La Jubileo de Taras Ŝevĉenko (1814-1861)*
- 28 Jarkunsido

**aprilo:**

- 4 Socia vespero
- 11 John Wells: *Lingva seminario* (1800h: konsilantaro)
- 18 Paska Vendredo (nenia kunveno)
- 25 Kimie Markarian: *La Soroban-Arto*

**majo:**

- 2 Socia Vespero

**Esperanta Kalendaro:**

18-20 aprilo: Brita Kongreso de Esperanto, *The Circle*, Sheffield [www.britakongreso.org](http://www.britakongreso.org)  
26 julio-2 aŭgusto: 99a Universala Kongreso, Bonaero, Argentino <http://uea.org/kongresoj>

**Aliaj anoncoj:**

*Prezentu ĉefprogrameron! Se vi havas taŭgan temon kiu amuzos aŭ informos klubanojn, ne hezitu proponi vin al la program-sekretario.*

*Bv. sendi informon al la bultenisto antaŭ 21a aprilo por mencio en la sekva Kluba Bulteno.*

**Olga Kerzjuk intervjuiĝis en BBC World News**


Ĉi tie estas du bildoj de la televidelsendo, fare de Zeinab Badawi en 13 decembro, menciita en la nuna Prezidanta Letero.



Ĉar 15 decembro nomiĝas "Tago de la Esperanta Libro", oni menciis dum la intervjuo la literaturon de nia lingvo. Olga profesie prizorgas kolekton de Esperantaj libroj en la prestiĝa Brita Biblioteko.



En 25 aprilo, Kimie Markarian prezentos pri soroban-arto



## Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere ĉe Londona Irlanda Centro. Antaŭ la ĉefprogramero kaj dum la paŭzo klubanoj kutime amasiĝas en la komforta enirhalo por kaftrinki kaj babili.

Kutima programo:

18:00 malfermiĝo kaj bonvenigoj

19:15 - 20:15 prelego aŭ alia ĉefprogramero

20:15 - 20:45 paŭzo

20:45 - 22:00 forumo, diskuto aŭ daŭrigo de la ĉefprogramero

22:00 fino



Loko: London Irish Centre,  
50-52 Camden Square, NW1 9XB  
(tel: 020-7916 7272)

Metrostacio: Camden Town

Fervojo *London Overground*: Camden Road

Busoj: 29, 253, 274, 31.

Kotizoj: £10 jare; fora membro: £6 jare.

Kluba retejo:

<http://www.phon.ucl.ac.uk/home/wells/lek>

Lokaj grupoj: Kingston: Roy Cliffe 020-8397 5895;

Orientlondono: Roy Simmons 01473-461346

rokeby@globalnet.co.uk; Sudlondono: Gregory Porilo

020-8672 8095 [esperanto-sleg@tiscali.co.uk](mailto:esperanto-sleg@tiscali.co.uk).

Federacioj: Orienta: John Redgwell, 17 Dover Close, Braintree, Essex CM7 5TD; Sudorienta: Kevin Murray, 11 Leybourne Ave, West Byfleet, Surrey KT14 7HB 01932-345779 [yarrump@gmail.com](mailto:yarrump@gmail.com).

Funkciuloj: Honora Prezidanto: Marjorie Boulton; Honoraj Vicprezidantoj: Valerie Atkinson, Husejn Al-Amily;

Konsilantaro: David Thornell (Prezidanto kaj Sekretario), Terry Page (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Matt Peperell, Michael Sims, Antony Rawlinson (Program-sekretario kaj Bultenisto).

Adresoj: David Thornell: Esperanto, c/o London Irish Centre (adreso supre) [lek.sekretario@gmail.com](mailto:lek.sekretario@gmail.com);

Arturo Prent: 7 Walton Garden, Hutton, Brentwood CM13 1EJ [ap\\_esp-lek21@yahoo.co.uk](mailto:ap_esp-lek21@yahoo.co.uk),

Terry kaj Anica Page: 7 Hampton, Gt Holm, Milton Keynes MK8 9EP [terry\\_page@btinternet.com](mailto:terry_page@btinternet.com), [anica\\_page@btinternet.com](mailto:anica_page@btinternet.com),

Antony Rawlinson: 5 Thorpe Crescent E17 5BY [acj.rawlinson@ntlworld.com](mailto:acj.rawlinson@ntlworld.com).

## Letero de nia Prezidanto

Karaj Klubanoj:

Menciindis sed ne aperis en lasta Bulteno jena novaĵo pri Esperanto-publico: LEK-aninon OLGA KERZJUK intervjuis Zeinab Badawi ĉe BBC-Televido, por dissendo la 13an de decembro 2013. S-ino Badawi estas mondfama ĵurnalisto; la koncerna BBC-programero ("World News Today") havas internacian spektantaron kaj Olga mem intervjuiĝis gratulinde bone. BRIAN BARKER, sindona publicisto por la Brita Movado, informis LEKanojn pri la afero perrete kaj tuje - ankaŭ per ligilo al aŭdvidea registraĵo de la intervjuo. Dankon, Brian! Kaj aplaŭdon por Olga!

Parolante pri gratulindaĵoj: Ŝajnas al mi, ke la komuna agado de pli junaj Esperantistoj etendiĝas kaj pliintensiĝas, kaj en Londono kaj tra la lando. Aktiveco ĉi-jardeke preskaŭ aŭdeble zumas: Per JEB, per novuloj kaj per vera, loka dompleno da Esperantistoj. Tia evoluo je nova sango havas evidentan signifon por la nuno kaj la estonto. Cetere kaj rekrilite al nia Klubo, iuj el tiuj aktivuloj gvidis programerojn en la LEKejo lastatempe - ekz. MATT PEPERELL kaj SAŜA KOVJAZINA. Pro ties prezentoj kaj prelegoj ĉe ni, ankaŭ venis aliaj plijunuloj, t.e. geamikoj, gastoj kaj alilandandaj vizitantoj. Tiel la etoso de LEK pliboniĝas kaj refreŝiĝas. Se do JEBanoj aŭ eblaj JEBanoj legas ĉi tiujn vortoj, bonvolu sekvi Matt, Saŝa k.s. - kaj proponu sin kiel prelegonton, ludgvidonton, koncertonton. Vigligu aliajn per propraj raportoj, rakontoj kaj distraĵoj. Renkontos vin varma bonveno!

Fine, ĉiuj anoj nepre legu la kunsenditan Suplementon. Tiel, la baldaŭa Jarkunsido (la 28an de marto) estos multe pli glata kaj ampleksa afero - kun pli da tempo por diskutoj kaj konsideroj - ĉar ĉiuj necesaj dokumentoj estos jam digestitaj. Kaj poste, venu al la Jarkunsido mem, kun viaj pensoj, proponoj kaj voĉdonoj.

Sincere,

David Thornell

